

La Dua Trilanda Kongreso en Bekasi



Ekde la 28-a de marto ĝis la 2-a de aprilo 2018 okazis la Dua Trilanda Kongreso en la urbo Bekasi, la dua plej granda urbo de okcidenta Javo.

Ĉi-jare la kongreso estis malpli granda ol la unua Trilanda Kongreso en 2016. Partoprenis 37 indonezianoj kaj 29 eksterlandanoj el 7 landoj, Aŭstralio, Nov-Zelando, Belgio, Hispanio, Koreio, Filipinoj kaj Orienta Timoro. Inter la kongresanoj troviĝis novuloj kaj junuloj el diversaj partoj de Indonezio. Pro la vojaĝsubteno disponigita de konto iesa-p ĉe UEA, ni sukcese venigis ilin. Ankaŭ estis bonega afero, ke venis 10 orienttimoranoj pere de subvencio aranĝita de Heidi Goes.

Vespere en la unua tago, la kongreso malfermiĝis. Unue la organizantoj de la tri landoj bonvenigis la kongresanojn. Post la diversaj

salutvortoj, ĉiuj prelegantoj havis eblecon por inviti kongresanojn al siaj prelegoj kaj laste ni kune kantis la himnon, La Espero. Ni ankaŭ ludis amuzajn ludojn en interkona vespero.

En la sekvanta tago kelkaj gravaj prelegoj okazis, kiel prelegoj de Humphrey Tonkin, kiu parolis pri la nuna situacio de Esperanto en la mondo, kaj la prezidanto de UEA, Mark Fettes, pri nuna situacio de UEA. Tiuj prelegoj estis aranĝitaj bone per skajpo. Samtempe en aliaj salonoj du invititaj instruistoj instruis Esperanton al komencantoj kaj progresantoj. Aliaj interesaj prelegoj estis prezentitaj de Albert Stalin Garrido, junulo el Filipinoj, kaj partoprenantoj el Aŭstralio kaj Hispanio.

Vendrede, la 30an de marto, okazis denove prelego per skajpo kun Jonathan el Aŭstralio. Poste pluraj prelegoj pri kulturo kaj aliaj interesaj temoj riĉigis la konon de kongresanoj. Vespere la grupo de orienttimoranoj prezentis bele la artan spektaklon. Sekvante ĝin, la kongresanoj grupe aŭ sole montris sian prezentadon en Arta Vespero.

En la ekskursita tago, sabate, ni forveturis al Ĝakarto por viziti la nacian galerion. Poste la partoprenantoj vizitis la nacian muzeon kaj “Taman Mini Indonesia Indah”, kiu estas rekomendinda loko por ke oni iom konatiĝu kun la diverseco de la indonezia kulturo. Vespere la aktivulo el Balio, Pande Sri, prelegis pri sia Esperanto-agado kaj sekve estis lingva festivalo, kies celo estis por iom lerni kaj praktiki aliajn fremdajn lingvojn.



La 1-an de aprilo, grupo de kongresanoj partoprenis la senveturilan tagon, kiu regule okazas matene en dimanĉo. Inter 6:00 kaj la 10:00 la aŭtomobiloj estas forpelitaj de la ĉefa strato de Bekasi. Tiel la homoj povas libere marŝi, bicikli aŭ kuri. Dum unu horo ni utiligis la eventon por reklami Esperanton al neesperantista publiko. Por kapti la atenton de ĉirkaŭaĵo, ni marŝis kun kongresa standardo, kantis kaj dancis kune. Poste kelkaj homoj proksimiĝis kaj demandis nin pri Esperanto kaj nia agado.



Impona prelego pri la historio de Indonezia Esperanto-movado estis prezentita de Heidi Goes. Ŝi esploris multajn detalojn pri diversaj indoneziaj esperantistoj, lokoj kaj eventoj. Sekve, Carlos Spinola prelegis pri uzado de Esperanto en la universitato de Valencio en Hispanio. Ankaŭ aliaj prelegoj estis interesaj kiel tiu de Park Soohyeon pri la manĝaĵkutimo de la korea tradicia festotago. Vespere ni kune iris al restoracio por bankedo.

En la lasta tago, matene okazis la fermo. Ni dirus, ke la kongreso estis sukcesa, ĉar la komentoj de partoprenantoj ĉefe estas pozitivaj. La ferma ceremonio multe substrekis, ke la valora aspekto de la kongreso estis amikeco. Por la tria kongreso, ni iomete komencis esplori la eblecon organizi la komunan eventon en Balio post du aŭ tri jaroj.

Ilia Sumilfia Dewi : ilia.dewi@gmail.com